# ELNA-BULTENO

ESPERANTO INTERNACIA LINGVO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 1(70) Februaro 1970

alv. 24 mar.!

### Semajno de Internacia Amikeco, feb. 22-24

Salutkartoj, kiuj portas bonvolmesaĝojn en kvar lingvoj, estas haveblaj ĉe la ELNA Komitato por Internacia Amikeca Semajno. P.O.Box 663, Houston, Texas 77006. La kosto estas: du - 5 ¢, aŭ kvindek - $1.00. Limigita provizo de 1"x 2" glumarkoj (25 maksimuma mendo) estas ankaŭ havebla po 1 ¢.

### Pri la Plena Ilustrita Vortaro

Se vi transloĝiĝis post vi mendis ĉi tiun vortaron, sendu senprokraste vian novan adreson al la eldonistoj: S.A.T., 67 Ave. Gambetta, Paris, France. Oni atendas la elsendon en proksimume unu monato.

### Por Fariĝi Fakdelegito

Via nomo kaj adreso troviĝos sub la indikita urbo en la adresaro de la Jarlibro, kaj ankaŭ en la indekso, se vi havas sinceran intereson en iu fako, estas kompetenta esperantisto, kaj se vi ĝuste surskribas la blankedon oficialan kion vi ricevos kiam vi petas ĝin de s-ro A. Doneis, P.O. Box 105, Pharr, Texas 78577. Oni devas nepre fariĝi fakdelegito antaŭ ol venas la Internacia Kongreso en Usono en 1972. Ĉu ne?

### Kiel Indiki Elekton de Senkosta Gazeto

Se vi ĵus realiĝis al ELNA, aŭ estas jam membro, sed ial ne indikis vian elekton de unu el la kvar eksterlandaj gazetoj por ricevi senkoste dum 1970, bonvolu sendi vian elekton rekte al Bonnie Helmuth, kiu prizorgos ĝin. (5943 La Jolla Corona Dr., La Jolla, Cal.92037.) Sed la novaj ELNA-aliĝiloj enhavas la informon, kaj sufiĉas se vi iel jam indikis vian elekton tie, aŭ alimaniere sciigis la kasistinon. Enhavpriskribo kaj blankedo estas sur la lasta paĝo.

### Nacia Kongreso en Kanado

La dekdua kongreso de la Kanada Esperanto-Asocio okazos en Ottawa, junio 26-28, 1970. Kotizoj: Kongresa -$8.00. Bankeda -$4.00. Por loĝrezervo kontaktu: Universitato de Ottawa, Labaret Halo. Unu persono en unulita ĉambro - $8.00 por unu nokto. Unu persono en dulita ĉambro-$5.00. Por kongresa rezervo skribu al Esperanto-Kongreso, 85 Sparks Strato, Ĉambro 315, Ottawa, Kanado.

### Internacia Kongreso

Ne forgesu aliĝi al la 55a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, Aŭstrujo, 1-8 aŭgusto, 1970. Vi povas ĝin nur ĝis la 20a de junio prokrastí.

### Zamenhofmonumento

En Nederlando en Zwolle, ĉefurbo de provinco Overijssel, estas bela bulvardo kiu nomiĝas "Zamenhof Singel." Oni ricevis permeson lokigi monumenton en parketo ĉe la fino de tiu bulvardo, kaj la urbestraro finance subtenos la projekton, kondiĉe ke la internacia geesperantistaro montras sian intereson por tiu ideo per sendado de ("iom da") mono por helpi. Mondonacojn vi bonvolu sendi al: Gemeentelijke Stortingsdienst, Zwolle, Nederlando. Enskribu ĝirnumeron 86 33 49, kontnumeron 80 63 31, kaj "por la Zamenhofmonumento." Listo kun la nomoj de la gedonacintoj aperos en la gazetoj.

# ELNA-BULTENO

**REDAKTOROJ:** Donald Munro
Rodney Ring

**ADRESO:** ELNA-Bulteno
Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

---

Esperanto en Turismo

La Komisiono por Turismo ĉe Bulgara Esperanto-Asocio aktive laboras por la enkonduko de esperanto en la praktikon. Ili kompilas liston de esperanto-parolantoj, kiu listo estos je la dispono de la dezirontoj en la grandaj urboj de Bulgario.Por informiĝi skribu al: Esperanto-Turismo, Poŝtkesto 45, Sofia, Bulgario.

Epitafo

En Burlington, Anglujo, en enterigejo, troviĝas ĉi tiuj vortoj sur tombo-ŝtono : "Ŝi loĝis kun sia edzo dum 50 jaroj, kaj mortis kun la fidela espero de plibona vivo."

William Auld Instruos en Usono

William Auld, la eminenta esperanto-verkisto, instruos somerajn kursojn ĉe San Francisco State College, julio 6-24. Daŭros tri semajnojn, donos tri valor-poentojn, kaj kostos $72.00. Loĝejoj kaj manĝoj estas nemultkoste haveblaj.

Novaj Kursoj

Ĉe Cabrillo College, lundon, la 19an de januaro, 1970, komenciĝis Esperanto kurso kiu uzas objektojn, bildojn, konversaciojn, diapozitivojn, kaj sonbendojn. Estas en la mezmarborda regiona de California.

Ĉe la San Diego Adult School en San Diego, California, kursoj por komencantoj kaj progresintoj, instruataj de Paul Steice, komenciĝis la 2an de februaro, 1970.

Televid-Intervjuo en Pennsylvania

S-ro William Simpson, kiu instruas esperanton ĉe Elizabethtown College, kun s-ino Carolyn Wiggins, sekretariino de la Harrisburg Adult Education Council, prezentis intervjuan programon pri Esperanto, kiu estis elsendita de la loka televida stacio dufoje la 10an de februaro.

## NI KORESPONDU

Germana iama maristo, nuna fervojisto, kiu esperantiĝis en 1967, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj librojn. Bonvolu afranki poŝtsendaĵojn tiel: "Taŭgas por kolekto." S-ro Joachim Groeschel, R. Breitschneidstrasse 70, 66 Greiz, DDR (GDR), Germanujo.

Studanto kaj esperantisto, kiu studas ĉe la Universitato de Praha, pro transpagaj problemoj deziras senmone interŝanĝi librojn kaj diskojn. Ivo Zelezhy, Vrchlickeho 41, Praha 5, Ĉeĥoslovakio.

Artistino, kiu instruas desegnadon kaj pentradon en liceo, volas korespondi kun tiuj kiuj interesiĝas en arkitekturo kaj popolarto. Maria Rojkowska, Bochnia (apud Krakow) UL.TA Szybem 15, Pollando.

Internacia muzeo fondiĝis en Budapeŝt, Hungarujo, por esperantaj fotoj en la formato 9 x 12 cm. (2 1/4" x 3"). Universala Esperanto-Hobia kaj Koresponda Klubo "FO-KI-MA" (t.e., Fotografado, Kinematografio, Magnetofono) deziregas fotojn pri la movado en Usono por uzi en publika ekspozicio. Ili serĉas kolorajn poŝtkartojn, glumarkojn, vinjetojn pri reklamoj por konvinki vizitantojn ke Esperanto vigle vivas ankaŭ en Usono. Ili promesas sendi novajn eldonaĵojn de FO-KI-MA al ĉiuj skribintoj. Bonvolu skribi al: Esperanto "FO-KI-MA," Budapeŝt 119, Poŝtfako 16, Magyarorzag, Hungarujo.

# ARTIKOLOJ

## La Du "Lunoj" de Marso

En la nuntempo kiam la homo jam vizitis la Lunon, kaj intencas vojaĝi al la planedoj, estas interese noti ke nia najbara planedo, Marso, havas du naturajn satelitojn kiuj aspektos al spacesploristoj tre malsimilaj ol nia Luno.

La satelitoj de Marso estas multe pli malgrandaj ol la Luno, kaj estas multe pli proksimaj al Marso ol la Luno estas al la Tero. Foboso (Phobos), la plej granda, ankaŭ estas pli proksima al la planedo. Ĝi havas diametron de dek mejloj, kaj ĝi situas 3600 mejlojn de la surfaco de Marso. Dejmoso (Deimos), la alia satelito, havas ses-mejlan diametron kaj troviĝas 12,500 mejlojn super la surfaco de Marso. Laŭ komparo, la Luno havas diametron de 2,163 mejloj kaj sia meza distanco de la surfaco de la Tero estas 234,000 mejloj.

La ŝajna pozicio de satelito en la ĉielo je iu difinita tempo dependas ĉefe de la rotacia direkto kaj rapideco de la planedo, la orbita direkto kaj rapideco de la satelito, kaj la distanco inter la satelito kaj la planedo. La rezulto de ĉi tiuj faktoroj estas ke la tempo inter leviĝo en la oriento kaj subiro en la okcidento, por Dejmoso, estas sesdek ses horoj anstataŭ dek du kaj duono por la Luno. Kiel la Luno, ĝi verŝajne moviĝas de oriento al okcidento. Kontraŭe, Foboso moviĝas rapide de okcidento al oriento -- la tempo de leviĝo ĝis subiro estas proksimume kvin kaj duono horoj.

La lum-fazoj de satelito dependas de la relativa pozicio de la satelito kaj la Suno dum la rondiro de la satelito ĉirkaŭ la planedo. La ŝanĝo de fazoj okazas pli rapide por Foboso kaj Dejmoso ol por la Luno. Dejmoso havas kompletan ŝanĝon de fazo en proksimume tridek horoj, sed Foboso faras la saman ŝanĝon en nur ĉirkaŭ sep kaj tri kvaronoj horoj. La faz-periodo de la Luno estas proksimume dudek sep tagoj.

Kiel ĉi tiuj satelitoj aspektas? D-ro Isaac Asimov, en sia libro "Science, Numbers, and I" deduktas, el nia scio de la afero, ke por observanto sur Marso, Dejmoso ne aspektas kiel lumigita objekto kun surfaco, ĉar ĝi estas tro malgranda kaj tro malproksima, sed kiel stelego dekoble pli brila ol Venuso -- "bela diamanto en la ĉielo." Foboso, laŭ d-ro Asimov, aspektas malsimile, kaj, ĉar ĝi estas sufiĉe pli granda kaj pli proksima, oni povus vidi la surfacon. Sed, ĉar sia gravita forto estas malgranda, ĝi probable ne estas sfera, sed neregula. Ĉar la distanco al Foboso estas pli granda kiam la satelito estas ĉe la horizonto ol kiam ĝi estas plej alta en la ĉielo, la verŝajna grandeco pliiĝas dum Foboso leviĝas, kaj malpliiĝas dum ĝi malleviĝas. La rezulto de rapida movado, rapida ŝanĝo de fazo, reflektado de neregula surfaco, kaj ŝanĝo de grandeco, estas konstante ŝanĝanta lum-desegno, kaj d-ro Asimov nomas la fenomenon: "kalejdoskopo en la ĉielo."

## Kuracado de Frostvundo

Dum la vintraj monatoj kiam oni piediras tra neĝo, estas ĉiam la danĝero ke korpmembroj fariĝos frostigitaj. Legu ni do la sekvantajn konsilojn por esti antaŭ-preparitaj:

Kion fari:

1. Rapide malfrostigu la korpparton.
   a. Metu ĝin apud la varma parto de via korpo, aŭ
   b. Metu ĝin en varmetan akvon (ĉirkaŭ 108°F.), aŭ
   c. Ŝirmu kaj kovru ĝin zorge.
2. Trinku varmegan kafon aŭ teon.
3. Tuŝu la korpparton malofte, kaj nur dolĉe kaj milde.

Kion eviti:

1. Ne frotu ĝin.
2. Ne metu en varmegan akvon.
3. Ne apudigu varmegan akvujon aŭ varmiglampon.
4. Ne tuŝu veziketojn, se aperas.
5. Ne kovru per neĝo aŭ glacio.

La vundo kiu nomiĝas frostvundo estas akirita per malseka malvarmo. La partoj de la korpo plej ofte frostigitaj estas nazo, oreloj, piedfingroj, vangoj, mentono, frunto, pojnoj, manoj, kaj la piedoj.

La simptomoj de frostvundo ŝanĝiĝas laŭ la graveco de la stato. Ordinare oni ne sentas doloron, tamen la parto estas rigida kaj sensenta. Unue la haŭto estas blanka aŭ griz-blanka, kaj poste fariĝas hel-rozkolora. Se la parto restas en la malvarmo, ĝi re-fariĝas blanka. Sed kiam oni revarmigas ĝin, ĝi subite fariĝas ruĝa kaj ŝvelinta; kaj veziketoj ofte aperas.

Grava frostvundo kaŭzas gangrenon, stato en kiu mola korphisto kaj eĉ ostoj estas tute detruitaj. Dum la kuracprocezo la gangrena histo forfalas, kaj jen sana histo restas sube. Sed, kompreneble, se la profunda histo detruiĝis, necesas fortranĉi la membron.

Kiam frostvundo komenciĝas, oni ekvidas ke la surfaco de la haŭto havas blankan aŭ vaksan aspekton. Se vi vidas tion, rapide donu al la viktimo urĝecan kuracon. Certe la persono ne sentas doloron kaj rifuzas, sed faru ĝin, ĉar tio estas ankaŭ simptomo.

Brako aŭ kruro kiu estis frostigita kaj poste malfrostigita devas esti levigita super la kutima korpnivelo.

Estu nepre antaŭpreparita. Se oni trovas sin en malvarma ŝirmilo en malseka malvarmo, oni devas ofte ekzameni la malkovritajn korppartojn (kaj ankaŭ de la amikaro) por gardi kontraŭ la frostvundo.

## Kampara Rakonto

Mi loĝas en la kamparo, kaj mi ofte havis tie perpleksajn spertaĵojn. La enloĝantoj de la urboj ne povas kompreni tion, sed kamparanoj ĉiuj scias ke ofte okazas tie kion nenio povas ekspliki.

Ekzemple, antaŭ dek jaroj mi havis bonan ĝardenon kaj laboris tie ĉiutage feliĉe. Unu tagon matene mi uzis la terhakilon por elfosi la herbaĉojn, kiam serpento iu, kiun mi ofte vidis apud la ĝardeno kuŝante en la varma sunbrilo, eksaltis por piki min.

Subite mi malantaŭeniris, kaj mi surpreziĝis, ĉar ĉi tiu maljuna serpento kutime estis laca kaj malmovema. Li penis mordi min, sed li atingis nur la tenilon de la hakilo.

Post tio, kompreneble, mi simple iris en alian parton de la ĝardeno kaj forgesis la aferon. Mi ne plipripensis ĝin ĉar estis nur malgranda parto de spertaĵplena kampara tago.

Unu dimanĉon dum mi piediris tra la ĝardeno por ĝui la florojn, mi observis grandegan ŝtipon apud la ĝardeno. Neniu povis klarigi la aperon de tiu ĉi ligna monstro, kaj mi do metis ĝin en la ŝarĝaŭtomobilon kaj transportis ĝin al la maŝinsegejo. Tie oni trancis ĝin en multajn lignerojn kaj nun mi havis la materialaĵon por konstrui hundejon kaj kokinejon. Tion mi faris.

Sed dum la posta sezono kiam mi farbis la novajn konstruaĵojn, mi relernis ion. La farbo enhavis fluidaĵon, eble estis la terebinto, kiu reŝanĝis la ŝvelintan terhakilon en la antaŭan grandecon! Feliĉe la bestoj ne estis en siaj novaj domoj, ĉar la domoj ekmalgrandiĝis!

Nuntempe mi havas unujn etajn birddomojn pendante de arbbranĉo por ... min pri la serpenta afero.

# POR STUDANTOJ

## La Koboldoj

Ĉi tiu rakonto okazis en la bonaj, antaŭaj tagoj kiam afablaj koboldoj (etaj homoj kiuj similas al feoj) montris sin kaj faris la vivon de maltrankvilaj homoj iomete pli ĝoja. Ili fariĝis lertaj metiistoj kaj loĝis feliĉe en la tero kun sia reĝo. Ilin oni nomis "la senofendaj amikoj de la mallumo," ĉar ili ne estis permesataj iri al la taglumo. Se unu el ili malobeus, li ŝanĝiĝus en ŝtonon.

La koboldoj ne ĉiam restis en la grundo. Fakte ili ofte venis al la surfaco de la tero trans truoj nomataj "koboldaj truoj," sed ili ĉiam evitis renkonti homojn.

Antaŭ multe da jaroj, en la urbo Kolonjo, loĝis granda aro de la hometoj, kaj la popolo sciis multajn rakontojn pri ili. Ĉar ili estis tiel helpemaj, la laboristoj de la urbo ĝuis multe pli da festtagoj ol la kalendaro indikis.

Laŭ la malnovaj rakontoj, ekzemple, dum la ĉarpentistoj dormis sur la benkoj, la etuloj prenis la ilojn kaj volante ĉizis, segis, kaj martelis; kaj kiam la ĉarpentistoj vekiĝis, la domo jam estis konstruita.

La etaj homoj faris same por la bakistoj. Dum la viroj ronkis, la koboldoj eniris por helpi. Ili pesis la farunon, knedis la paston, kaj metis la panon en la fornon; kaj antaŭ ol la mallaboremaj bakistoj malfermis la okulojn, la bruna, krusta, matena pano kuŝis en vicoj sur la tablo.

La buĉistoj kaj la barelistoj ankaŭ havis tiajn agrablajn travivaĵojn.

Okazis ke s-ro Cotton, lerta tajloro, havis la honoron fari dimanĉan jakon por la urbestro. Li penis diligente fari la taskon, sed pro la varmego de la somera posttagmezo, la kudrilo falis el sia mano kaj li profunde dormis. Post tiam, unu koboldo post alia, singardeme, ŝtelpaŝis el sia kaŝejo kaj eniris la laborejon. Ili grimpis sur la tablon, kaj komencis la tajloran laboron. Ili mezuris, kudris, kaj gladis kvazaŭ ili estis estintaj tajloroj dum la tuta vivo.

Kiam s-ro Cotton vekiĝis, li trovis komplete fabrikitan jakon, kaj la laboro estis tiel bone farita ke li povis prezenti la bonegan veston al la estro de la urbo.

Dum la beleta edzino de s-ro Cotton rigardis la majstraĵon de sia edzo, ŝi ekhavis petolan ideon; kaj en la nokto dum sia edzo dormis, ŝi ellitiĝis senbrue, dismetis pizojn sur la plankon de la laborejo, kaj metis duone finitan kompleton sur la tablon. Tiam ŝi atendis malantaŭ la pordo. Baldaŭ la ĉambro estis plena de etuloj kiuj glitis, falis, kaj transkapiĝis; kaj samtempe ili kriegis, ĉar ili kontuziĝis kaj vundiĝis. Tiam senhalte ili forkuris malsupren kaj malaperis.

La edzino de la tajloro aŭdis la bruon kaj pensis ke la afero estas granda amuzo. Kun lanterno en la mano, ŝi malfermis la pordon; sed estis tro malfrue. Ne eĉ unu koboldo restis malantaŭe.

Post tiam oni ne vidis la amikemajn koboldojn en Kolonjo; kaj en aliaj lokoj ili ne plu aperas.

<u>Notu:</u>

Se vi observus aŭ aŭdus raportojn pri revivado de kobolda agado, bonvolu raporti la faktojn al la redaktoroj.

# OFICIALAĴOJ

<u>Anonco</u>

Dumviva membreco en ELNA kostas nur $ 160.00.

<u>Pri Lokaj oficejoj</u>

La estraro de ELNA decidis plene restudi la problemon de oficiala(j) oficejo(j) antaŭ ol fari decidon pri la daŭrigo, ŝanĝo, aŭ forigo de la nuna oficeja sistemo.

La estraro prezentas la jenajn supozojn: (1.) ELNA, kiel volontulara organizo, volas dividi sian laboron inter siaj membroj en pluraj lokoj, se eble; (2.) iu oficiala oficejo de ELNA ne povas funkcii en iu loko sen daŭra helpo de volontuloj el la koncerna loko, kaj (3.) iu oficejo de ELNA, eĉ se esence naci-ampleksa, donas apartan avantaĝon al la Esperanto-movado de la loko aŭ regiono kie ĝi troviĝas.

Tial ELNA pretiĝas por konsideri la fondon de oficiala informoficejo en iu ajn loko kie la loka aŭ regiona movado donos sufiĉan financan kaj laboran apogon. ELNA do petas ke ĉiu loka aŭ regiona grupo kiu havas aŭ deziras propran oficejon (ĉu en loko publika aŭ ne), kaj kiu deziras ricevi por tio financan aŭ alian apogon de ELNA, sendu plenajn detalojn al ELNA, per la adreso de la Prezidanto. Indiku la nunajn kaj proponatajn statojn kaj funkciojn de la oficejo, priskribu la apogon ricevotan de la loka aŭ regiona movado se ELNA decidos starigi aŭ kunadopti oficejon en la koncerna loko, kaj taksu la kvanton da financa kaj materiala apogo atendota el ELNA.

Bonvolu sendi vian proponon al la Prezidanto de ELNA, s-ro Francis E. Helmuth, 5943 La Jolla Corona Drive, La Jolla, Cal. 92037.

<u>Ekstraj Ricevotaj Publikaĵoj</u>

KONTAKTO estas kvaronjara gazeto de la nova generacio. Ĝi esploras problemojn de la hodiaŭa societo ĉirkaŭ la mondo, kaj enhavas multajn ilustraĵojn.

HOMO KAJ KOSMO estas popularscienca gazeto verkita de astronomoj. Ĝi enhavas interesplenajn faktojn, perpleksajn enigmojn, kaj konkursojn pri la naturo. Ĝi ankaŭ aperas kvaronjare.

NORDA PRISMO, la plej respektita literatura gazeto en Esperanto, aperas kvaronjare kaj enhavas abundajn novajn poemojn, rakontojn, kaj traktatojn kun ilustraĵoj.

HEROLDO, duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado, enhavas novaĵojn pri la problemoj kaj la sukcesoj de la mondmovado. (Nur novaj abonantoj povas elekti ĉi tiun ĉifoje.)

---

Bonnie Helmuth
5943 La Jolla Corona Drive
La Jolla, Cal. 92037

Mi jam pagis por ELNA-membreco dum 1970 ($8.00 aŭ pli) antaŭ ol anonciĝis la elekto de senkosta gazeto. Mi deziras ricevi:

(substreku <u>unu</u>!)

Kontakto, Homo kaj Kosmo, Norda Prismo, Heroldo (Nur por novaj aliĝoj.)

Nomo kaj Adreso ____________________________________________

____________________________________________ Zip Code ______________.